

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Francalandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

JANUARO - FEBRUARO

1973 1

KULTURAJ KAJEROJ

1973 JANUARO - FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

Pri Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Esperantisto en la oazo A. Grine

Kaporoj : medicino kaj gastronomio

Tra la mondo per biciklo A. Beta

Dependus de hareto

La virino kaj la kastoro

Kelkaj rusaj poemoj

Nia konkurso P. Chevalier

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

Jam alvenas multnombre informpetoj pri nia 1973-programo. Jam pluraj gesamideanoj el pluraj landoj sendis sian aliĝilon. Laŭsperte ni scias, ke tiu alveno de informpetoj kaj aliĝoj akceliĝos ek de februaro kaj marto. Do, karaj geamikoj, ne tro prokrastu la anoncon de via intenco ĉeesti iun el niaj paskaj aŭ someraj periodoj.

Dum la Paskaj ferioj okazos du periodoj. De la 11-a ĝis la 17-a de Aprilo JEFO organizos la dekduan Kulturan Semajnon. Ĉijare la temo elektita estas « Kunvivado » inter socioj, inter malsamaj politiksistemoj, inter generacioj. Bona temo pritraktota en Domo, kie jam delonge renkontas unu la alian homoj diversdevenaj, diversopiniaj, diversgeneraciaj en etoso amikeca. Renkonto de malsamaj opinioj estas ĉiam pliriĉiga ol simpla konversacio inter homoj samopiniaj, kondiĉe, kompreneble, ke ĉiu diskutanto ne enfermiĝu inter altaj bariloj senpordaj, senfenestraj. Ni esperas, ke multaj gesamideanoj ĉefe junaj sed ankaŭ ne plu junaj ĉeestos, por ke tia kunvivado ne estu nur teoria sed praktika sperto de tiu periodo.

La dua semajno de Pasko (18-25 Aprilo) estos dediĉita al studado per kursoj, konversacio kaj distraĵoj.

La someraj periodoj altiros, ankaŭ ĉijare, la gesamideanojn, kiuj deziras samtempe perfektigi sian scipovon kaj praktikadon de la lingvo, kaj ĝui agrablajn feriojn, partopreni ekskursojn. La prelegoj farotaj dum la dua periodo estos pli diversaj ol tiuj de la lasta jaro permesante al ĉiu trovi sian plezuron en malbone konataj aŭ tute ne konataj temoj.

Jam nun petu nian ĝeneralan programon. Ni esperas konigi al ĉiuj interesatoj pli precizajn programojn pri ĉiu periodo en Februaro.

Ĝis baldaŭ en Grésillon.

NE PLU ATENDU

Pagu vian abonon tuj.

Helpu nin per abonigo de viaj geamikoj aŭ gekorespondantoj. Ju pli kreskos la nombro de abonantoj, des pli kreskos la kultura valoro de la revuo... kaj via plezuro.

(Vidu adresojn de perantoj sur la lasta kovril-paĝo).

Por Francio : **P. BABIN,** 13, bd la Chauvinière — 44 - NANTES

Poŝtkonto : NANTES : 2 813 61

Esperanto tra la Mondo

PRI LA VENONTAJ MANIFESTACIOJ

— La universala kongreso (28/7 - 4/8) prepariĝas en Beogrado. La organizantoj denove enprogramigis « Vesperon de esperanta kanto kaj kanzono ». La fervojoj asignas 25 % - an rabaton por vojaĝantoj al internaciaj kongresoj je aĉeto de irrevena fervoja bileto.

En Francujo, U.F.E. (Unuiĝo Franca por Esperanto), 34, rue de Chabrol, Paris (10e), preparas aŭtobusan karavanon al la kongreso tra Italujo, Jugoslavio, Aŭstrujo, Germanujo (24/7 - 11/8).

— La Junulara kongreso en Sarajevo (21 - 27/7) havos la temon : « Junularo kaj la hom-medio ». Adreso : 29a I.J.K. YU-71000 Sarajevo, V. Pelagica 8/1, Jugoslavio. Ĉiuj partoprenantoj loĝos kaj manĝos en la luksa studenta hotelo « Indeks ».

— Kongreso de Sennacia Asocio Tutmonda (S.A.T.), en Toronto (Kanado), 30/7 - 5/8. Organiza komitato : P.O. Box 246, Station F.. Toronto.

— Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.) en Maribor (Jugoslavio), antaŭ la universala kongreso, 20 - 26 de Julio.

— 3a Amikeco - Kongreso, Grezijono : 19-20 majo 1973. Memoru la daton ! Skribu : P. Delaire. B.P. 901, 45010 Orléans.

— La 6a Pupteatra Internacia Festivalo, okazos en Zagreb, kaj aliaj jugoslaviaj lokoj, inter la 1a kaj la 7a de Oktobro. La 5a, kuniĝos 8 pupteatroj el Rumanujo, Jugoslavio, Pollando, Bulgario, Ĉekoslovakio, Britujo. Se vi interesiĝas pri marionetoj, notu la adreson : I.K.S., Amruseva 5/1, 41000 Zagreb, por ricevi informojn. La komitato eldonis 20-paĝan katalogon kiu estas ilustrita pri la manifestacio.

— Internaciaj feriaj Esperanto-kursoj en Helsingor (22 - 29/7). Adreso : L. Friis, Ingemannsvej 9, DK-8230, Abyhof, Danlando.

— Internacia Esperanto-feriosemajno, en Kromenie - Assendelft, Nederlando (5 - 12/8). Adreso : S-ino A.v.d. Meulen, Popelstraat 13, Krommenie, Nederlando.

— Al 14-a « Europa Feriosmajno en Svislando kore invitas Svisa Asocio de Esperanto - Fervojistoj. Ĝi okazos de la 2-a ĝis la 8-a de Septembro 1973 sur Fürigen ĉe la Kvarkantona lago (Vierwaldstättersee) kaj ampleksas gvidatajn ekskursojn variajn, antaŭtagmezajn Esperanto-lecionojn diversgradajn, vesperajn aranĝojn distrajn. Geesperantistoj de ĉiu aĝo kaj profesio estas bonvenaj. Anoncojn kaj informpetojn oni adresu al S-ro Ernst Glättli, SAEF - sekretario, Laurstrasse 17, CH-5200 Brugg (Svislando).

SVISA RADIO EN DIALOGO KUN SIAJ AŬSKULTANTOJ

Okaze de la 25-a jubileo de la Esperanto-elsendoj de la Kurtonda Servo de Svisa Radio, al konkursaj demandoj respondis aŭkultantoj el 28 landoj en 5 kontinentoj. Fine de la jaro 1972 kaj komence de 1973 Svisa Radio kun kvar elsendoj ĉiusemajne (du serioj : unu pri svisaj temoj, alia pri Esperanto) dediĉas entute 16 elsendojn al babilado kun la skribemaj aŭkultantoj. Apud Romo, Bern estas unu el la stacioj kun la plej multjaraj programoj, apud Varsovio kaj Pekino unu el la plej oftaj ĉiusemajnaj.

Petu la regulan sendon de la programoj al eksterlando, skribante al : Svisa Radio, SOC, CH-3000 Bern 16, Svislando.

NOVA FILMO PRI AŬSTRALIO EN ESPERANTO

La Aŭtralia Registara Oficejo por Novaĵoj kaj Informoj eldonis novan Esperantlingvan kolorfilmon (16 mm., 20 minutoj) pri Aŭstralio. La filmo nepolitike prezentas la ekonomian evoluon kaj eblecojn de la lando en moderna stilo.

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

De la 19-a ĝis la 25-a de Februaro 1973 estos festata Semajno de Internacia Amikeco, semajno, kies emblemo « Amikeco trans limoj » celas al pli fortiĝo de la internacia interkompreniĝo pere de la Internacia Lingvo Esperanto. En la lastaj jaroj, la semajno estis pli kaj pli agnoskata de oficialaj instancoj. Ĉe kelkaj usonaj urboj (Ĉikago, San Francisko, Tampa, St Petersburg) oficialigis ĝin. Pluraj dunaciaj societoj kunfestis. Pliaj aktivecoj estos atendataj por 1973. Interŝanĝo de salutoj al eksterlandaj geamikoj estas speciale akcelata.

INTERESAJ BROŜUROJ EL GERMANA DEMOKRATA RESPUBLIKO

Skribante al Kulturbund der D.D.R., Abt Esperanto, Charlottenstrasse 60, 108 Berlin, vi povas senpage ricevi kvante du broŝurojn : « Gravaj koncizaj informoj - D. D.R. » kaj « Junularo ».

« JUNA AMIKO » REVUO POR LERNEJANOJ

Vi povas aĉeti en la naciaj esperanto-asocioj, provnumeron de « Juna Amiko », 24 paĝa provo de revuo preparita de 24 personoj en 18 landoj, ĉefe por lernejanoj. Ĝi estas eldonita de Hungara Esperanto-Asocio.

NOVA SIGLO : A.I.D.M.L.K.

La Asocio Internacia por la Defendo de Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj kiu kunvenis lastjare en Aŭstrujo, adoptis la esperanto-formon de sia nomo kiel oficialan.

« SENĜENAJ DIALOGOJ » EN PLURAJ LINGVOJ

Je la jarfino, aperis ĉe la eldonejo Matignon (Parizo) franca traduko de la sciencpopulariga verko « Senĝenaj dialogoj », verkita originale en Esperanto de Alberto Fernandez.

Tiu eldono okazis eksterserie sub la titolo « Dialogues insolites ». Versio en nederlanda lingvo estas preparata.

Pluraj verkoj originale verkitaj en Esperanto estis tradukitaj en ĝis 20 lingvoj. Aliflanke, Esperanto ankoraŭ pli ofte servis kiel pontolingvo por literaturaj tradukoj, kies rekta tradukado ne estis ebla. Ankaŭ per tiuj procedoj riĉiĝis la trezoroj de verkoj en Esperanto.

DIVERSAJ ELDONAĴOJ

— « La sporta lingvo en Esperanto » de Tibor Ujlay-Nagy. En formo de projekto, la aŭtoro proponas fakterminojn por 30 sportobranĉoj.

— « Esperanto, lingvo de la sporto » de Ralf Harry. Trilingva konversacilibreto (germana, esperanta, angla).

— « Winnie-la-Pu » de A.-A. Milne, tradukita de Ivy Kellerman. Por Infanoj.

— Ni memorigas pri la revuo : « La monda Lingvo-Problemo ». 3 numeroj jare ; abono : 25 gld.

Esperantisto en la oazo



Ĉe sudokcidento de Tunizio kaj komenco de « Ŝot el Ĝerid » troviĝas Zaŭit el Arab ; inter grupo da malgrandaj aliaj vilaĝoj, ĝi enhavas cent kvindek familojn, en domoj konstruitaj per koto kaj trunkoj de palmarboj. Mi estas kontenta vivi en tiu malriĉa oazo kie mia familio, la maljuna azeno, la hundo, kelkaj kokinoj, ĉiuj loĝas en la sama dometo.


Tiu vilaĝo staras apud ĝardenoj, vivas el agrikulturo kaj rikolto de la daktiloj. La religio estas Islamo.

Vespere oni vidas la ĝardenistojn kiuj, kun siaj azenoj, portas herbojn por siaj kaprinoj kaj kunikloj, fruktojn kaj legomojn por siaj gefiloj. Ili rectiĝ en siaj ĝardenoj la tutan tagon, laborante.

Preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj sin nutras el la sama manĝaĵo : la kuskuso kun legomoj ; post ĝi, oni preparas teon sub la lumo de karburaĵa lampo.

Dum la aŭtuno okazas multaj geedziĝoj. Celebriĝas ankaŭ du grandaj festoj honore al la Sanktulo de la vilaĝo, dum kiuj muzikistoj ludas per tamburo kaj fluto, dancistoj pafas per pulvofusiloj. Dum tuta nokto la vilaĝaninoj preparas kuskuson por la festa tago ; oni portas kvantojn da ĝi en grandaj lignaj vazoj, al la moskeo, por la vizitontoj.

En la vilaĝo fluas, inter la domoj, multaj riveretoj ; staras multaj palmarboj apud la muroj de tiuj domoj. La klimato estas varma, ĉiam brilas la suno ; la luno





kaj la steloj, precipe dum printempo kaj somero, plibeligas la nokton ; nur, vintre, kelkaj gutoj da pluvo. Mirinde subiĝas kaj leviĝas la suno inter la longaj palmarboj...

En tiu vilaĝo viglas verda stelo. Min instigis franca amiko (el Hems) lerni Esperanton, kaj, nun mi ĝuas fenestron malfermitan al la mondo...

Laŭ originalaĵo de Abderrahman GRINE.

KAPOROJ : Medecino kaj gastronomio

Ĉu floroj ? ĉu grajnoj ?

La kaporoj, kiuj aromigas saŭcojn (blankan, « holandan », blankan vinon sur riverfiŝo) estas la florburĝonoj de arbusto, kiujn oni kolektas, kiam ili estas sufiĉe dikaj, sed ankoraŭ ne malfermiĝintaj.

Kaporoj estas konataj de nememorebla tempo. La Antikvuloj ilin uzis ne nur por gustumado sed ankaŭ por medicino.

Pline asertis, ke kaporojn-manĝintoj ne plu suferas, nek pri paralizo, nek pri lieno-doloroj.

Dum Renesanco-tempo, laŭ onidiro, kaporoj kontraŭis al Pesto. Eĉ Florenca Medicinisto sukcesis resanigi malsanulon, kiu suferis pri lieno-skiro : li manĝigis al li kaporojn akvumitajn per akvo, en kiu forĝisto estis estinginta fandiĝantan feron.

En la XVIII-a jarcento S-ro Tronchin uzas la kapor-foliojn por kuraci histeriajn vaporojn kaj diversajn nervozajn perturbojn.

Por la podagruloj jen recepto : 40 gramoj da kaporuja radiko, polvigita, macerita en unu litro de ruĝa vino kun ŝelo de frakseno, de tamariko kaj florpintaĵoj de hiperiko donas vinon diurezan, tonikan kaj apetitdonan.

Post kuirado, tiu radiko donas plastron por flegi la ulcerojn kaj oleon por frotado okaze de iskiaj doloroj.

Tamen estas en gastronomio, ke oni plej multe uzas kaporojn.

Preparado de la flor-burĝonoj ne multe ŝanĝiĝis laŭlonge de la jarcentoj. Oni rikoltas ilin de junio ĝis septembro, ĉiun duan tagon. Oni faras amasojn da ili sur tukoj kaj poste oni ilin metas en bareletojn : unu kilogramo da kaporoj en unu litro da vinagro. La tuto restas tutan semajnon en obskureco. Fine oni ilin translokas en peklakvon kun aromaĵoj kaj cepoj. Tie ĉi ili restos 3 monatojn.

Olivier de Serres (1539-1613), unua franca agronomo, donis tute saman recepton « Tervazo, interne vitrigita, — bona vinagro — kelkaj plenmanoj da salo. Enen ĵeti kaporojn — tute ne lavitajn. Ilin rigardi post 4-5 tagoj kaj se okazas ŝimaĵo, ĝin forpreni kaj aldoni pluan plenmanon da salo por korekti la superfluan eligaĵon ».

Tiamaniere preparita, ekscitanta kaj stimulanta, la kaporo estas rigardata kiel unu el la plej bonaj kondimentoj por spici kelkajn manĝojn tro grasajn aŭ tro sengustajn. Al raguoj ĝi alportas agrablajn efluvojn. Konfititaj en vinagro kun drakunko'o aŭ satureo ili pli spicas la « reviglaĵon ». Fine kelkaj spertaj kuiristoj opinias ilin nepre necesaj ĉe la farĉitaj olivoj.

La kaporujoj estas plej diversaj : 700 familioj ; kelkaj estas arboj, arbustoj, aliaj herboj. La kaporacoj, kiuj pli precize interesas nin entenas 250 speciojn. En ĉiuj same ĉeestas kemiaj ĉeloj, kiuj alportas al la frandemuloj kondimenton akran kaj stimulantan.

Kaporujoj devenas de tropikaj kaj subtropikaj regionoj de Azio kaj Afriko. Ili instaliĝis kaj sovaĝece vivas sur la ĉirkaŭo de Mediteraneo.

En Nord-Afriko kreskas « Macrua Crassifolia », malalta arbo kun griz-verda foliaro, plena je suko kaj kovrita je pikiloj. Kameloj, kaprinoj kaj ŝafoj tondmanĝas tiujn dornajn foliojn, kiuj ankaŭ aromigas la tradician kuskuson.



En franca Provenco kaporujoj akompanas olivarbojn. Tiuj arbustoj ne estas postulemaj ; ili ne timas sekecon ; al ili sufiĉas kalka grundo, ŝtonhava taluso, muro el sekaj ŝtonoj, monteto-flanko orientita al sudo.

La rikolto varias : de 500 gramoj ĝis 3 kilogramoj, kondiĉe, ke la arbeto estu recepita ĉiun aŭtunon ; ĝi vivas 25-30 jarojn. Se ni ne prenas la burĝonon, ni havos belegan floron intense odorantan. La longa pistilo tre alte staras super la petaloj ; la multaj stamenoj larĝe disetendiĝas.

Mistero restas : oni ankoraŭ ne scias, ĉu estas la insektoj, kiuj efektivigas la polenadon.

Sed, eble, kaporoj estas nur luksa donaco de la Naturo por niaj palatoj.

TRA LA MONDO PER BICIKLO

(KELKAJ VOJAĜNOTOJ)

Alveno en Döbeln ĉe mia kamarado Posern

Mi transiris la germanan limon en Strasburgo, la 29 an de Julio 1928, spite mia makulita pasporto pro akviĝado en Mulhouse, kaj alvenis en Döbelnon, la 2an de Aŭgusto.

Kvankam mi estis atendita, la tuta familio estis emociigita. La kamarado Paŭlo Posern forestis, sed li alvenis senprokraste, kaj tuj ni vizitas la kamaradon Ŝmidt, kiu estas la kvazaŭa organizanto de tiu aventuro. Li estas la gvidanto de loka esperanta rondo, kaj perfekte parolas france. Kompreneble, min li bonege akceptis kaj dum pli ol du horoj, ni pridiskutas nian estontan iradon.

Kamarado Posern samaĝa kiel mi, estas ankaŭ laboristo, li laboras en loka uzino, kiel orpoluristo. Korekte li parolas esperanton, kaj iom angle, li, same kiel mi, havas bonan apetiton, kaj fumas pipon. Ni estas pretaj kunvojaĝi tra la mondo per biciklo.

En Sovjetunio

...Unua ekmiro : forestas hoteloj. Fervoja laboristo akceptas nin por loĝi ĉi-tiun nokton, en dometo kies pureco estas « germana ». Baldaŭ nia amiko komprenigis al ni ke ni devas antaŭirigi nian brakhorloĝon, de unu horo. De nun ju pli ni iros orienten, des pli ofte ni devos tion fari regule. Fine estas litkovrila « ceremonio » laŭ slava metodo : ni kuŝos apud fornego, super speciale aranĝita « grunda planko » kie dum frosta nokto, ni povas varmiĝi. Mi tamen restados 18 monatojn en Sovjetunio, el kiu mi foriris de Vladivostoko, la 27an de Julio 1930.

La margaŭan matenon, apenaŭ ekster la fervoja vilaĝo, tri aŭ kvar junaj soldatoj alparolas nin, kaj subite, tuta taĉmento nin ĉirkaŭas. La soldatoj estas ĉiuj vestitaj per longegaj manteloj, dube flavaj, kaj unu el ili havas malgrandan triangulan insignon sur kolumo, petas niajn pasportojn.


Alia surprizego mirigis nin tute baldaŭ : vojo forestis ! Ne plu estas vojo, eĉ ne tera vojeto. Kiel daŭrigi bicikladon en tiaj kondiĉoj. Restis nur fervojo, kaj vole ne vole, ni devas laŭiri la fervojajn relojn, sur piedira vojeto, kiam ĝi ekzistas.

Post 50 km da irado tra la fervojaj ŝpaloj, mi jam ekpensis veturi per biciklo super la reloj, same kiel vagonaro...

...Preskaŭ unu jaron poste, la 11an de Junio 1929 vespere mi alvenis en Kazanon, ĉefurbo de aŭtonoma tartara respubliko kaj fame konata universitata urbo. Miaj celoj : ĉiam la samaj : vizo de pasporto kaj precipe, riparado de biciklo. Ĉi tie, mi denove provos tion kion mi fiaskis en Moskvo, kaj Omsk, konstrui aparaton por bicikli sur fervojaj reloj, kaj ankaŭ havi la permeson rajdi tiamaniere ĝis Vladivostoko.

Por kompreni la sekvontajojn, mi devas iom klarigi la tiaman situacio en Sovjeta Siberio. Apenaŭ antaŭ 12 jaroj la revolucio triumfis, sed, post detruo de malnova mondo, ĉio restis farenda, kaj rekonstruo svarmas ĉie. Viro kiel mi estis konsiderata ne nur kiel iom freneza, sed ankaŭ kiel malsaĝulo, ne serioza, kaj iom ĝenanta.

Tamen la propagando tuŝis la amasojn, kaj, kvankam duonfreneza, mi tamen jam trairis la duonon de la tuta sovjetunio per mia nura biciklo sur abomenaj vojoj. Krom la amindaj popolamasoj, dekomence, mia ĉefa subtenanto estis AVTDORO, kiu en rusa lingvo signifas : Asocio por disvastigo de aŭtomobilaj vojoj kaj ĝenerale de modernaj transportaj rimedoj. Por tiu asocio mi estas ekzemplo de obsti-



neco kaj de espero por la estonta vojreto. Krom tio, la akcepto kiun faris al mi sufiĉe fame konataj turistaj kaj sportaj kluboj, precipe biciklaj kluboj, influis jam... Mi ankaŭ havis la ŝancon trovi ĉi-tie bonegajn esperantistojn. Se la kredo levigas montojn, la kredo en mi, ebligis al tiuj kamaradoj venki ĉiujn barojn... Dank'al gekamaradoj Anonimov, Trigulov, Skarajatin, F-ino Kisileva, dum tri semajnoj ni klopodis por mekanika riparo ĉe registaraj instancoj, AVTODORO, kaj ŝtata uzineto. En tiu uzineto, la laboristoj min ovaciis, kaj venkis la estraron kaj direktoron sed... mi devis trovi la tutan necesan materialon ĉe memstara libera merkato de brokantuloj. Finfine post kelkaj tagoj la riparejo « pruntis » al mi bonegan mehanikiston : la kamarado Ruŝ, sed en tiu laborejo mankis ĉio, eĉ marteloj. Finfine, la 22 an

de Julio mia aparato estis finita laŭ mia plano. Kun kamarado Ruŝ kaj kelkaj esperantistoj, ni tuj provadis ĝin, sur fervoja garaĝa relo. Stranga aparato... Mi ne scipovis ĝin rajdi, sed knabeto, kiu tute ne scipovis bicikli, triumfe pedalis kiel ĉampiono. Mi komprenis ke la malfacilaĵoj venis de mia flanko. Mi devis lerni la uzadon de mia nova invento.

La 30an de Junio 1929 mi foriris de Kazan pere de mia aparato kaj kun la unua permeso rajdi sur reloj de la siberiaj fervojoj. Gruparo de kuriozu'oj kaj ĵurnalistoj min fotis kaj intervjuis. La saman tagon, tiuj intervjuoj estis publikigitaj ĝis Japanlando kaj Ĉinujo... Kompreneble ili estis por mia estonta alveno, la plej bona propagando. Ĝis vespere, mi tamen rajdis ĉirkaŭ 80 km, falis du aŭ tri fojoj, precipe post pluvo, ĉar la pneŭmatikoj glitis sur la malsekaj reloj.

Okazis al mi du aŭ tri akcidentoj, sed ĝenerale mia aparato permesis al mi veturi tage ĉirkaŭ 100-130 kilometrojn...

En Japanlando

...S-ro Kanazaŭa venis al la ŝipo por min akcepti, kaj min akompani bicikle ĝis la kongresejo. Ni estis atenditaj. Unua impreso : surprizo, rezervo, kiuj baldaŭ transformiĝas en deliran entusiasmon. Mi estis ovaciita kiel neniam ĝis nun ! oni min ĉirkaŭis, min tuŝis, kaj ankaŭ mian biciklon, ĉiuj demandis ion al mi.... kaj hurais !

Post nepra purigado, mi estas invitita malfermi oficiale la 18an nacian japanan kongreson, antaŭ proksimume 1000 delegitoj de ĉiuj japanaj provincoj. La salono estas vastega, kaj oni ĝin dekoraciis per ĉiukoloraj flagetoj. Same kiel antaŭ du jaroj en Liono, mi miregas pro la reciproka kompreno...

...Merkredon la 20an de Aŭgusto 1930, je la 5a vespere, mi alvenas antaŭ impona marmora palaco de Tokio : Kibośa Kulturejo kie mi recevos vere princan akcepton, dank'al eminentaj esperantistoj. Mi estis akceptita de tre gracia grupo de junulinoj (kiaj ekzistas en japanujo) eŭrope vestitaj, kiu min avaciis sur honora ekstera ŝtuparo... La honora akcepto kiun oni faris al mi estas certe misproporcia kun mia modesta personeco, sed tamen dum mia tuta restado en Japanujo kaj precipe en Tokio, mi renkontis tiun subtilan kaj delikatan gastemon...

...La 23an de Aŭgusto 1930 mi vizitas modernan leprujon. Unue oni montris al mi anatomiajn organojn por ke mi bone vidu la ĉefajn lezojn kiujn la lepro okazigas, al tiuj organoj. Estas terure... Jen ĉambrego de gravaj malsanuloj... Ĉi tiu havas manon tute korodita, jam forestas unu aŭ du fingroj, la vizaĝo de tiu alia aspektas kiel tiu de terura gnomo.

Ĉinio en 1930

Politiko : Ĉiu provinco estas memstara teorie, sed praktike subiĝas pli malpli al fremda aŭtoritata influo pere kaj fare de militaj generaloj, duonbanditoj, kiuj rabe majstras unu aŭ plurajn provincojn. Inter ili la plej fama estas Ĉan Kaj Ĉek, la bofilo de Sun Ja Sen. Nuntempe li fariĝas ĉefgeneralo kaj respublikestro, post sangaj bataloj kaj teruraĵoj, precipe kontraŭ novvenintoj sur la politika kampo : la komunistoj kies gvidanto estas nuntempe tute nekonatulo : Mao Ce Tun...

...Kial kaj kiel mi instruis en Kantono ? En kantono mi estis akceptita de du eminentaj civitanoj kaj esperantistoj : S-roj Von Ken kaj Aŭ Sin Pak. Ili ambaŭ oficias en publika instruado, kaj ĉefaj ĵurnaloj de Kantono. S-ro Sin Pak proponis al mi instrui Esperanton en urbaj altlernejoj. Mi akceptis, ĉar ĉi-tie en Kantono, la Esperanto-movado estis sufiĉe malvigla... Neniam de la komenco de mia vivo, mi tiom laboradis per mia kapo por ellabori mian kurson laŭ rekta metodo de pastro Če. Ĉion mi devis aranĝi, ĉar mi ne havis gramatikon, kaj multaj el miaj gelernantoj eĉ ignoris ke ekzistas alia skriba metodo ol tiu kiun oni praktikas en Ĉinio. Mi devis do komenci instruadon de la latina alfabeto...

Vizitado de la Angkor temploj en Kamboĝio

...Unuaj impresoj de Angkor temploj : miro, ili estas kolosaj, grandiozaj, belegaj, teknike rimarkindaj. Super la ĉefaj monumentoj oni vidas ŝtonegojn de pluraj tunoj, kiujn oni metis pli ol 20 metrojn alte...

...En la areo de la malkovrojn oni ĉiutage malkovras pli malpli grandajn sanktejojn kaj mi rimarkas ke plej ofte, la vojoj kiuj radias en la arbaro, estas faritaj per longaj unuopaj ŝtonegoj, kiuj similas tiujn kiujn oni malkovras en Francujo, sur la malnovaj romiaj vojoj... Kaj, kvankam mi biciklis en la tuta regiono, mi ne ekvidis ŝtonminejon. Ankaŭ mirindaĵo : de kie venis tiuj ŝtonoj ? Kiamaniere oni elminigis ilin kaj transportis ĝis ĉi-tie ?

Fina konkludo

Mia vojaĝo havis du celojn :

— Unue studi la ĉefajn kaŭzojn de la Militoj.
— Due pruvi al mi kaj aliuloj kion povus fari por paco la internacia lingvo Esperanto.

Mi substrekas ke de naskiĝo, mi estas proleta ido, tio estas laŭ difino, laborulo kaj kanonkarno... en mi, mi rekonas ĉiujn proletojn de la terglobo, kaj mi opiniis ke mi povos ilin helpi, precipe por ke la estontaj generacioj ne faru denove la samajn erarojn kiujn faris niaj antaŭuloj kaj samtempuloj. Mi ankaŭ substrekas ke militemo estas ankaŭ homa malkvalito ; kaj militemulojn oni trovas en ĉiuj medioj, eĉ, bedaurinde, en proletaj rondoj.

Mi konkludos jene : « Se ci volas pacon preparu militon » sed mi nepre aldonos devizon, kiun la homoj aplikos pli kaj pli, mi esperas : « Se ci volas pacon, pacon ci preparu »...

Ekstraktoj de la verko de Alfa Beta.

DEPENDUS DE HARETO !

Mi ĵus eliris el la brakoj de Sinjorino Sherlock Holmes, kiam — jen mia ŝanco — mi renkontiĝis kun ŝia edzo !

« He ! bonan tagon ! diris la eminenta detektivo ; ĉu oni vespermanĝos kun mi ? Preskaŭ de jardeko oni ne vidis vin ! ».

Io el mia emocio certe montriĝis sur mia vizaĝo. Sherlock ruze ridetis :

« Mi vidas, kio estas, li diris ; Sinjoro iras ĉe amikinon ! ».

Se mi neos, ŝajnos, ke mi faras misterojn ; se mi jesos, ŝajnos, ke mi volas lin eviti. Do, mi respondis — iom haste — ke tiela amikino povos atendi ; se mi ne estos alveninta je la oka, estos je la naŭa ; kaj se ŝi montriĝos nekontenta, mi eĉ ne eniros sian domon !

Sherlock metis sian manon sur mian ŝultron, streĉe fiksis miajn okulojn kaj diris :

« Ne balbutaĉu, mia kara, mi estas insidinta vin ! Veredire : vi estas ĵus elveninta el rendevuo ! ».

Tremo trakuris mian korpon, ĝis miaj haroj, kiuj stariĝis.

Feliĉe li aldiris : « Sufiĉe da ŝercoj ! Ni iru al restoracio ! Mi bedaŭras, ke mi ne povas inviti vin hejmen ; oni ne atendas min, ĉar estas la libertago de la servistino ».

Mi opiniis min savita !

Mia amiko iom revis antaŭ sia supo kaj mi pensis, ke liaj pensoj postkuris profesiiston je poŝoŝtelo aŭ je «speciala vagabondado ». Subite lia piedo leĝere frapis mian maleolon :

« Jen la pruvo ! » li diris.

Aj ! Denove tio kaptis lin.

« Jen la pruvo, neneebla, nerefutebla, ke vi certe eliras el rendevuo ! ».

Li klarigis : « Viaj botetoj estas nur duone re-butonumitaj : aŭ oni surprizis vin je l'freŝa faro .... tamen hipotezo neakceptebla, ĉar, videble, virina mano ame bantigis vian kravaton... aŭ via amikino apartenas al familio, en kiu oni ne uzas butontirilon... ekzemple : en angla familo ».

Mi afektis rideti.

« Ĉiu virino, mi aludis, havas har-pinglon, kiu avantaĝe anstataŭas buton-tirilon ! ».

« Via amikino ne havas harpinglon ! Eble, vi ne scias, ke kelkaj anglinoj formis ligon kontraŭ har-pingloj. Cetere, sen tiel malproksime serĉi, mi povas aserti, ke la virinoj, kiuj surmetas perukon, ne uzas harpinglon. Tion mi povas firme aserti : Mia edzino estas el tiuj ĉi ».

« Ha ! », mi diris.

Evidente estis, ke li ĝojis min torturi.

Plue, tiu stultulo estis min lokinta kun la dorso apud la fenestro ; el ĝi fluis ĥrablovo, kiu, ĝismedole, eniris min.

Mi ternis. Eligante mian naztukon el mia poŝo, mi samtempe faligis alian, larĝan apenaŭ kiel mia mano kaj ornamitan je punto.

Sherlock ĝin metis sur la tablon, streĉe enprofundiĝis en sia meditado.

« Estas virina naztuko ! », li fine prononcis.

Kaj li ridetis al mi.

« Infano ! vi infanece perfidas vin ! De post lago kaj Otelo, tia akcesoraĵo apartenas nur al opereto ! ».

Kvankam mi ne volas esti maldiskreta, ĉu vi permesas al mi ĝin ekzameni ?

« Vi povas, mi stulte balbutis, ĝi estas pura ! ».

Por doni al mi sintenadon, mi fajfetis. Sed, ŝajnis al mi, ke oni povus aŭdi muŝojn ! sed tiuj aĉaj bestetoj, timigitaj, retenis sian zumadon. Mia koro, kvazaŭ motoro, rapidire ronkis meze de tiu silento. Sherlock trinkis fingrolarĝon da Bordeaux-vino, retrinkis duan fingrolarĝon kaj metis unu el la siaj sur la naztuketon :

« Ŝi estas la edzino de iu, kiu malfidas al ĉio kaj estas akrasenta... ĝi ne portas inicialojn ! ».

Mi malstreĉiĝis kaj glutis du grandajn glasojn da akvo. Sherlock enflaris la naztukon kaj delikate alproksimigis ĝin al mia nazo :

« Kion ĝi odoras ? », li demandis min.

Feliĉe Sherlock Holmes neniam aŭskultas sian dialoganton. La demandoj, kiujn li esprimas, estas respondoj, kiujn li faras al si mem. Li tiamaniere rezonis : « Por mi ĝi neniam odoras ; do, estas parfumo, je kiu mi estas alku-

timiĝinta : ekzemple, la « Kongo » de mia edzino ».

Tiuj, kiuj neniam estis kaptitaj en draŝmaŝino aŭ en laminatilo, tute ne povas konscii pri la tenpremilo, kiu pistis mian koron. Mi kliniĝis al mia telero... kaj klopodis trovi apetiton, en silento tia, ke ĝi duobligis la alton de la aertavolo, kiu pezis sur miaj ŝultroj. Sherlock insiste fiksis min :

« Jen haro », li diris.

Mi plu kliniĝis al mia telero, dirante :

« Ne estas haro ! Eble poreaĵo ! ».

Ne respondante li leviĝis, etendis al mi la manon kaj prezentis al mi (de sur mia palto preninte ĝin inter polesko kaj montrofingro) oran, silkan, suplan fadenon ! — verdire, unu el tiuj haroj, kiuj tiel belas sur la ŝultro de amanto, ... kiam, tamen, estas la kapo de la amatino, kiu estas ĉe ĝia ekstremaĵo.

« Nu, li diris, kio estas tio ?

— Tio, mi respondis (kun tono, kiun mi volus indiferenta, sed kiu montriĝis provokema), kiel mi mem diras : estas haro ! ».

Li ĝin demetis sur la blankan tablotukon. Mi profitis la trablovon kaj la neatentemon de mia turmentisto por direkti al tiu haro fortan ternon... la haro iom leviĝis, ondumis kiel serpento sur sia vosto... tamen ne forlasante la tablon ! Ho ! perfidaĵo !

« Re-ternu », ordonis Sherlock, kiu evidente bone komprenis mian artifikon.

Tion mi trovis malbona !

« Se vi bezonas ternon, ternu vi mem ! ».

Li ternis : la haro iom leviĝis, ondumis... (vidu supren !).

« Vere, estas peruko-haro ; la radiko gluas ! ».

La haro estis diagonale falinta sur la tablo, kaj same kiel kadavro ĝi apartigis nin. Morta ĝi ŝajnis al mi multe pli longa ol vivanta !

Sherlock eltrinkis el sia glaso kaj ĝin uzis, kiel lupeon... malgraŭ miaj klopodoj por verŝi al li « Chablis » vinon, cetere abomenindan.

« Vere, ĝi estas haro de mia edzino », li diris.

Mi malkaŝis mian teruron sub vualo de afabla spritaĵo :

« He ! He ! mi afektis, Sinjorino Sherlock estas bela ! Vi flatas min !

— Povra amiko ! ... Irlandanino, kiu vizitaĉadis ĉiujn trinkejojn ».

Morto estas preferata al necerteco. Mi tute ne ŝatas etfajre morti... precipe en ĉeesto de kelnero, kiu ĉion aŭskultas dum la servado. Mi energie forpelis la entrudiĝinton. Poste, leviĝante kaj murdokule rigardante Sherlock Holmes, mi ekkriis : « Kaj vi, ĉion klarigu ! ».

Ŝajnis al mi, ke mi estis ekkaptante taŭron je ĝiaj kornoj... Sed mi sentis kapabla fari ĉion ajn !

Cetere, mia kontraŭulo montris respektan ironion.

« Jen, en du vortoj », li diris. Vi ĵus eliris el rendevuo. Vi konfuziĝas je mia vido.

Do, vi bezonas, ke mi ne sciu la nomon de tiu ino, kiu prodigas al vi siajn favorojn.

Viaj botetoj estas ne konvene rebutonumitaj.

Estas la tago, dum kiu mia servistino lasas mian edzinon sola el la hejmo.

Vi faligas naztuketon, kiu apartenas al mia edzino.

Mi trovas sur via ŝultro haron el ŝia plej bela peruko. Do...

(Miaj palpebroj batis. La tempo malrapidis, inverse de mia koro-batado).

Do... rediris Skerlock, kiu fiksis min per okuloj, similaj al tiuj de boao, tuj glutonta bovon...

Do... vi mem konkludu !

Mi konkludis... renversiĝante en mia fotelo kaj karesante la kolbon de mia revolvero, bonega 12-pafa pistolo, mi konkludis :

« Stultaĵo, ĝi ne estas ŝarĝita ! ».

« Do, senemocie », diris Sherlock (konfesu ĉion, mia povra amiko, mi estas tute ne riproĉema al vi)...

Do, Vi estas la amanto de mia servistino ! ĉu ne ?

« Kelnero, mi kriis, kie vi kaŝas vin. Jam de longe ni vokas vin ; Alportu ĉampanon ! ».

El Jean GIRAUDOUX.

La Virino kaj la kastoro

Ja, kastor-instinkto estas denaska kunnaskita ĉe la homa masklo. Certe plejparto el la viroj rifuzus per si mem pano-faradi, aŭ per si mem tajli siajn vestojn. Sed kapablaj anstataŭigi masoniston, entrepreniston kaj eĉ ĉu temas pri konstruo je ilia domo, ili tuj sentas sin arĥitekturistoj. Tamen la moderna vivo tute ne kuraĝigas tiun kastor-instinkton. Rilate dometojn grandserie konstruitajn sur partigita tereno, aŭ rilate domegojn kunposede venditajn, partopreno de la loĝontoj pri koncepto aŭ konstruo de tiu ellaboraĵo pli kaj pli reduktiĝas.

Sed la simil-kastora masklo ne facile rezignas siajn rajtojn. En Usono, kie la civilizacio, normigita kaj matriarka, plej streĉe subigas Lin, li reagas dank'al « do it yourself » t.e. « Brikolado », science kaj komerce organizita. Sufiĉas trarigardi, en usonaj porviraj gazetoj, la multajn reklampaĝojn dediĉitajn al ekipaĵo, cele al br.kolulo por konstati, ke tiu agado preskaŭ ekskluzive koncernas loĝlokon.

Ne estas en Usono, ke oni vidus famili-estron ataki konstruon de Chevrolet en sia post-kuirejo ! Kontraŭe, li povas, se tion li deziras, ĉiuprintempe, tute refari sian centran hejtadon, ankaŭ laŭkolore adapti sian tegmenton al la roboj de sia edzino.

La fakto, ke la ekipaĵo estas, tre multekosta kaj rerentebla, pri la afero šanĝas nenion. Kontraŭe tio permesas formeti de la brikolado ĝian nesocialecan karakteron kaj ĝin reenigi en la ekonomikan rondon. Alidire ĝia renteco estas transigita de la brikolulo al la brikolaj-vendisto, kio, kompreneble, estas multe morala kaj konforma al la superaj postuloj de la libera entrepreno.

Certe, la homa kastor-masklo tute indiferentas pri tio. Kvankam mi ne estas Usonano, mi povas mem propra ekzemple tion ilustri :

Antaŭ kelkaj jaroj, mi malkovris, en la brokantvendejo, malnovan spegulon, kiu šajnis al mi tute taŭga por la, de mi jus farbita, vestiblo ; plue, ridinde malmulte kosta : 15 NF ; Mi plejzorge ĝin alportis hejmen kaj anoncis, ke mi mem ĝin instalos en la vestiblo.

Tiel ege malkvietiĝis la familio, ke mi sentis min devigata konsulti spertulon : nome, mia najbaro S-ro Bourdoche, metistate : masonisto. S-ro Bourdoche fingrumis la muron kaj deklaris : « Necesa dubli ! »

— Dubli ? Per dublo ?

— Ne, per dublilo ! Tion vi trovos ĉe la ladaĵisto. Sed ĝin prenu solida ; masiva, estas tiu muro !

Mi aĉetis la dublilon kaj je ĉi tiu okazo mi ankaŭ havigis al mi novan martelon (la malnova havis strangan kutimon : ĝi perdis sian kapon, ĉiufoje kiam oni petis de ĝi daŭran laboron).

Iom pli poste šajnis urĝa aĉeti « Trikosteril » — skatoleton pro celum-eraro. — Jen : la du unuaj truoj, supre, estis belegaj. La malfacilaĵoj komencis kun la tria, malsupre, dekstre. Post tuta horo de dublado, la kavo ne superis duonon de milimetro. Mi rapide sendis mian filon al S-ro Bourdoche. « Estas betono-plata ! respondis la eksperto. Nepras funkciigi la « arkimedan borilon ! » (drilon). Sed li tuj aldonis : nune la mia ne estas disponebla. Mi kuris ĉe la ladaĵiston kaj aĉetis la drilon. Ja, prefereble, mi ĝin elektis perfektigita, 3-rapiduma kaj kun aŭtomata malkluĉo.

Oni havas memestimon : 3 borpintojn mi rompis antaŭ ol denove voki S-ron Bourdoche. Ĉi foje, persone li venis. « Ne taŭgas tiaj borpintoj ! diris li. Por betono, necesas ŝtalo, ekstre dura ! »

Videble estis ŝtalo ankaŭ treege kara !

Tiuj ĉi borpintoj kostis kvinfoje la ordinarajn. La ladaĵisto havis borpintojn nur 10 milimetrajn ; nu, la hejloj, kiujn mi havis hejmen estis nur 8 milimetraj.

— Donu al mi 4 hejlojn 10 milimetrajn, diris mi.

— Mi vendas ilin nur po 12.

— Donu dekduon.

La tria truo estis borita sen doloro. Mi atakis la kvaran ; estis briko tute putrita ; mi obtenis kavon sufiĉe larĝan por enteni mian pugnon.

— Necesos garni per gipso, diris S-ron Bourdoche ; sed neniam estos tre solida. Bezonus aĉeti...

Sed mi preterignoris... kaj bone estis al mi. La spegulo perfekte tenis dum 3 tagoj. Je la kvara ĝi falis sur la kapon de mia filo, kiu ricevis eĉ nenian vundeton !

Vere ekonomia tiu spegulo ; imagu la apoteozistajn elspezoin, kiujn ĝi povus esti okaziginta al ni. Vere ! Kia bona afero !

La morgaŭon, mi mendis alian spegulon ĉe speguliston : ĝi kostis 150 Fr. kaj estis iom pli malgranda ol la antaŭa. Opiniante, ke mi estis sufiĉe montrinta mian bonvolon, mi lasis la speguliston fiksi li mem la objekton kaj elekti, kiujn truojn taŭgis kaŝi. Kion ajn oni faris, du el la 4 truoj restis videblaj. Li elektis la du suprajn.

Do, restas al mi la du malsuprajn por ilustri miajn kastorajn virtojn kaj kia ilustraĵo ! ĉu vi konas multajn personojn, kiuj povas fanfaroni pri, hejme, truoj, kiuj kostas 70 Fr. po kuba metro ?

Ja ĉiuj viraj iniciatoj, rilate loĝlokon ne estas tiel multelspeziga ! kelkaj tamen rivelas fortan originalecon ; tiele : inventisto, inter miaj amikoj, vivis en kamparo, en pluretaĝa domo ; dezirante pligrandigi ĝian loĝeblan surfaĉon, li ekpensis forigi la ŝtuparon. Post kelkaj malfeliĉaj provoj helpe de nodo-šnuro, ŝtupetaro, vinĉoj kaj eĉ paraŝutoj por descendi, li estis devigata rekonstrui la ŝtuparon... ekstere de la domo ! Mi citas tiun ekzemplon nur por montri ĝis kiagrade atingas la vira genio ... kiam li povas libere ekzerciĝi.

— Sed la Inoj kuraĝas malsanktigi la kastorecan ritaron.

Sed, malfeliĉe estas baraĵoj ! La precipa estas la premo de la virina « grupo ». Intence mi diras « Grupo ». Eĉ en la vivo de geedzoj — sen infano — la tele-stirado de viro aŭ dresado de kastoro estas samaj kolektivaj entreprenoj. La virino estas proparolanto de kolektivaĵo, kiu entenas ne nur la posteulinojn (filinoj kaj nepinoj), la antaŭulinojn (patrinoj — bo — aŭ ne) la kolateralinojn, la agnatulinojn kaj cognatulinojn, sed ankoraŭ la vartistinojn kaj mastrumistinojn, la najbarinojn, la provizumistinojn kaj eĉ la amikinojn tute ne specialigitajn.

Esence malsanktigi la kastorecan ritaron kaj formeti de la vira agado ĝian noblan karakteron, estas la taktiko de la virina « Grupo ».

Jerome K. Jerome majstre ilustris tiun taktikon en sia artikolo dediĉita al Onklo Podger.

Kion intencis fari Onklo Podger ? Li volis Planti Najlon ! Šarĝita de la tuta religieco de « Phallus » — kultoj, Simbolo inter la simboloj, Plantado de Najlo estas eminente nobla gesto.

Necesas, ke la celebranto atente pripensu antaŭzorgojn, petas fidindajn helpantojn kaj ke li mem interagas nur en la decidiga momento : « Kie estas la najloj ? Serĉu por mi la martelon ! Oni alportu la ŝtupetaron ! Ne tiun ĉi ! la malgrandan ! Nun : la elektran lampon ! Kie estas la elektra lampo ? Apogu la ŝtupetaron tien ĉi ! Alportu la rubando-metron ! La krajonon ! Bone tenu la ŝtupetaron ! Mi bezonas la martelon ! Donu al mi najlon ! Mi diris UNU, ne DU ! Reprenu la martelon ! Donu al mi alian krajonon ! Plialtigu la lumon ! Zut ! redonu najlon ! Prenu la krajonon ! Redonu la martelon ! Firme tenu la ŝtupetaron ! Aïe ! Iru serĉi aliajn najlojn ! torditaj estas tiuj ĉi ! Kaj pli bone lumigu ! « Sakra nomo de hometo ! » K.T.P.

Kiam la ritaro estas efektivigita kaj la litanio recitita, ĝenerale la najlo estas plantita.

Nu, kia estas la virina sintenado ? Ni ne hezitu tion diri : estas sintenado malpia kaj eĉ blasfema !

Kiam pri la demando : « kie estas la najloj ? » oni sisteme respondas : « Tie, kie ci ilin lasis lastan fojon ! »

Kiam, anstataŭ alporti la ŝtupetaron, oni sugestas al vi, ke vi mem iru ĝin serĉi.

Kiam oni metas martelon, najlojn, krajonon kaj elektran lampon, intermiksite sur la trian ŝtupeton de la ŝtupetaro, jus tien, kien post momento vi metos la piedon...

Kiamaniere estas eble trovi en si sufiĉe da spirita libereco por koncentriĝi sur la granda ellaboraĵo ! Kio okazas ?

La kastoreca instinkto perdiĝas. Pro la premo de la virina Grupo, la ekstera anonima Manlaboro triumfas en ĉio, kiu estas vere bela, vere granda, vere ekcitanta en la aventuro de la loĝej-konstruo.

Sekve, al la hom-kastoro restas nur malnobelaj, humilaj taskoj : malŝtopi la lavŝtonon, purigi la kaldronegon de la centra hejtado, olei la pordhokojn de la pordo, kiu knaras, pendigi la kurtenojn post lavado !

Kiu redonos al la hom-kastoro, kun lia kreiga libereco la genion de lia speco kaj la orgojlon de lia sekso ?

KELKAJ RUSAJ POEMOJ

Tradukitaj de Aleksandro Logvin ...

AFANASIJ FET (1820-1892)

Mi alvenis kun saluto...

Mi alvenis kun saluto
Diri, ke la suno varma
Jam vekiĝis por la tuto —
Ĉie tremas lumo ĉarma ;
Diri, ke arbar' vekiĝis
Per la ĉiu branĉa ero,
Per birdaro ekvigliĝis
Pro soif' al primavero ;
Diri, ke por mi alblovas
Ekde ĉie gajo pura,
Kaj silenti mi ne povas —
Ĝas kanto jam matura.

Nico, Decembro

Ho tiu sudo, tiu Nico !...
Ilia brilo min kortuŝas !
Kiel vundita bird', la vivo,
Sin levi volas, tamen kuŝas...
Nek flugo estas, nek vasteco ;
Flugil' rompita velke pendas,
Kaj ĝis, en polvon enpremita,
Dolore tremas, kvazaŭ plendas...

SERGEJ JESENIN (1895-1925)

Dum vesper' blua, dum vesper' luna
Estis mi iam bela kaj juna.
Nereteneble, plu neripete
Ĉio traflugis... foren... kaj preter...
Palaj okuloj kaj fridaj koroj...
Blua feliĉo ! Luna nokthoro

MIĤAIL LERMONTOV (1814 - 1841)

Roko

Noktis eta nubo orkolora
Sur ŝtonbrusto de giganto-roko,
Ĝi forflugis ĉe ekbril' aŭrora :
En lazuro ludis flok' kun floko ;
Tamen restas signo akvoguta
En sulkaĵ' de l'roko, kiu tie
Sola staras kaj medite muta,
En dezerto ploras nostalgie.

TEODORO TJUTĈEV (1803-1873)

Mi amas frue en la majo
La fulmotondron kun reson' —
Petolas bru' kun laŭta gajo
Sub la ĉiela bluplafon'.
Sonoras juna rulsonado...
Pluv' ŝprucis, polvo estas for !
Trembrilas perloj de l'pluvado,
Sur filamentoj — suna or'.
De l'monto bruas la torento,
Arbare sonas birdbrigad',
Kaj ĉio en tumulta sent'
Reeĥas gaje al tondrad'.

IVAN TURGENEV (1818-1883)

Mi vagas apud lag'... Nebulas
Bondforma pint' de l'monta lok',
Arbar' malhelas, sone rulas
De fiŝkaptistoj intervok'.
En diafane ombra reto
Silentas helĉiela mond'.
Malvarme spiras en kvieto
Duone ekdorminta ond'.
Alvenis nokt' ; post varma, brila —
Ho koro ! — post tumulta hor' —
Vi tiam dormos en trankvila,
En lasta dormo, mia kor' ? !

... Originale verkitaj

ANATOLIJ PARPARA

Kun sincera dédiĉo al Aleksandro Logvin.

Soneto n° 2

Ne povas esti akuzata grajn'
Pro ĝia senhelpeco en kaoso.
Estas simila semo kia ajn —
Milia kaj de baobab-koloso.
Do en la mondo — klare sen parol' —
Ne simple ekaperas la titanoj —
Destino, grund', nutraĵoj el plenmanoj —
Jen kies estas unugrada rol'.
Elkreskas ĉio sub la fata grap' :
Tritiko orkolora — por la pano
Kaj pin' — por masto de ŝipanoj...
Nur sendependе staras baobab'.
Jarmilo eĉ sub ĝia kron-titano
Kvietiĝinte sidas, kiel knab'.

G. ZALTO

La vivo de l'homo

La homo naskiĝas por vivo surtera
En formo de bulo da karmo mizera.
Nur suĉi kaj ori la tukojn kapabla
Kaj ĉiujn agaci per kri' malagrabla.
Sed baldaŭ aperas unuaj ridetoj,
Unuaj ekstaroj, unuaj paŝetoj,
Kaj jen li jam kuras tra tuta la domo,
Ankoraŭ malgranda, sed preta jam homo.
Kaj poste alvenas la tempo ĝojplena
De la infaneca ekzisto serena :
Petoloj kaj ludoj, patrinaj karesoj,
Unuaj pri l'viv' kaj pri l'mondo impresoj ;
En ĉio ĉirkaŭe miraklojn li trovas
Kaj ĉion scivole esploras kaj provas.
Forpasas la ora epok' infaniĝa —
Li iĝas jam knabo solida kaj saĝa.
Lernejo malfermas al li sian pordon ;
Ekkonas li nun disciplinon kaj ordon.
Per scioj plenigi la kapon li devas,
Sed ĉiam la koro pri ludoj nur revas,
Kaj lamas la lerno. Pardonon li petas,
Sed sian rimenon la patro demetas...
Plu kuras la jaroj, kaj la pantolono
Jam estas farata laŭ moda fasono.
Li jam cigaredon sekrete ekfumas,
Kaj vinon de l'patro ŝtelece gustumas.
Futbalo kaj cirko, lernejaj petoloj,
Pri l'ĉarmo knabina unuaj scivoloj...
Sed pasas knabeco, alvenas junaĝo,
Razilo ektuŝas al lia vizaĝo.
Amuzoj kaj ĝuoj la vivon plenigas,
Al agoj frivolaj lin ofte instigas.
Kun belaj fraulinoj sublunaj promenoj,
Kun bonaj amikoj senbridaj festenoj...
Sin sekvas la jaroj post unu alia,
Vekiĝas en li la instinkt' familia —
Kun juna edzin' brak-ĉe-brako li iras
Kaj sian ideton ravite admiras ;
Li baldaŭ fariĝas persono kun sperto
Kaj kun senharaĵo sur nuko kaj verto.
Li siajn infanojn bonmore edukas
Kaj siajn aferojn profite kondukas,
Sed ĉiam antaŭ en la aĝo rapidas,
Kaj li la kvindekan printempon ekvidas.
Kaj jam li solene edzigas la filon
Kaj poste preparas por nepo lulilon.
Alvenas la fina de l'vivo etapo —
Griziĝas la lasta haret' sur la kapo,
Diversaj malsanoj la koron atakas,
Skleroz' kaj kancero en liton lin pakas,
Kaj restas nur tombo en la perspektivo,
La horo ekbatas, finiĝas la vivo...

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Bonvolu legi la regularon en la numero 1972-5.

UNUA PROBLEMO (10 poentoj)

Ŝak-enigmo

Ĉi tiu enigmo kašas du demandojn de nia Majstro, je kiuj doni jesan respondon — sen konscienciproĉo — estas laŭdinda kaj honorinda virto por ĉiu esperantisto. — La enigmo estas solvebla laŭ la movo de la ĉevalo sur la ŝaktabulo.

Ni akceptos ĝis la fino de Marto la solvojn de la antaŭaj problemoj, samtempe kun tiuj de la nunaj.

★	via	Ne	te	ro	★
ro	kaj	bo	te?	ni	nes
la	te?	te	Ho	Ir	mal
es	ko	ran	am	Bru	fla
ĝan	hal	en	la	for	as
via	pe	ti	sen	mo	las

DUA PROBLEMO (20 poentoj)

En la ĉisubaj frazoj, bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj vortoj. Estos kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste trovita, sed estos forprenita po 1 poento por ĉiu vorto malĝuste elektita.

1) ...parolis al li, ...Li eniris en la salono, kaj li subite ... tute pala ; oni kredeble estis ... al li tre malagrablan novaĵon.

2) Ĉu estas vi mem ... skribaĉis ... leteron ?

3) Entenate vi trovos ĉekon ... mil frankojn, ...ĉe Crédit Lyonnais.

4) Ili trompas ... unuj la aliajn.

5) ...estis la vetero hieraŭ ? Varmeta, ne pluvis, sed ventis.

KOREKTITAJ PROBLEMOJ (1971-1972)

Ni komencas, sub tiu titolo, la publikadon de la solvoj de la konkurso de la lasta jaro :

N° 6 (1971)

Unua problemo

1) Iru, *pretigu* vin.
2) Forĝisto ; por *mortigo* de homo, estis kondamnita *je pendigo.*
3) Vi neniam revenigos lin el *lia* tombo.
4) Frazo korekta.
5) Cikado tre malsata iris *proksimen* al formiko.
6) Morgaŭ, ni iros ĉe nia*n* onklo*n* (aŭ : al nia onklo).
7) Li havas ĉirkaŭ sesdek jajroj*n* (aŭ : li estas... jara).
8) Cu mi devas piki lin *per* mia halebardo ?
9) Frazo korekta.
10) Estus *dezirinde,* ke ni *estu* amikoj *al* ĉiuj nacioj.

Dua problemo

1) Matena horo estas plena de oro.
2) Laboro kaj pacienco kondukas al potenco.
3) Frukto malpermesita estas plej bongusta.
4) Ne šovu la nazon en fremdan vazon.
5) Kiu semas venton rikoltas fulmotondron.
6) Malbona herbo froston ne timas.

(sekvota).

GRAMATIKO PER BONHUMORO

PREPOZICIO antaŭ INFINITIVO
(Lingvaj Respondoj : 127)

« Ĉiu prepozicio, laŭ sia logika esenco, povas esti uzata nur **antaŭ substantivo** » (li promenas kun sia amiko).

— Okaze de verba esprimado, oni uzas la verban substantivon (kun saluto ; sen respondo ; malsato pro manko de nutraĵo).

— Tamen **ANSTATAŬ, ANTAŬ OL, KROM, POR** (rolante kiel konjunkcioj) akceptas post si infinitivon :

anstataŭ babiladi .. ; antaŭ ol viziti lin ... ; vi povas fari nenion, krom kunbati viajn dentojn (z) ; por ŝafon formanĝi, lupo ĉiam trovas pretekston (z).



Krom paroli pri la pejzaĝo...

Antaŭ ol enaŭtobusiĝi, la turistoj — por trankvile profiti la sieston — petis de mi, ke mi fotu la plej belajn vidaĵojn ĉirkaŭ la rodo.



Antaŭ ol enloĝiĝi

— Laŭ la plano, antaŭ ol esti sidantaj en la manĝo-ĉambro, ni iris laŭ la koridoro ; preter ĝi estas la infan-ĉambro kaj ni povas iri dekstren por admiri la kuirejon ;

— anstataŭ babiladi sensencaĵojn, ni devus preni ekzaktajn mezurojn por la mebloj.



El la subkonscio

Mi devas konfesi ion al vi : antaŭ la dikaj nazoj kaj la stultaj oreloj de miaj klientoj ĉiam naskiĝas en mi nerezistebla emo al estetika kirurgio : anstataŭ razi barbojn mi preferus beligi la vizaĝojn : je ĉiu fojo mi devas ĉiam pli forte firmteni mian manon.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE.

Finnlando : S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (10 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (6,2 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE.

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 1 de 1973, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Le compte d'exploitation de l'année 1972, qui sera envoyé à tous les sociétaires et commenté à l'Assemblée générale du mois de mars, confirme ce que j'écrivais dans le dernier numéro de la revue. Les recettes des séjours sont en augmentation de 17 % environ, mais les dépenses, elles-mêmes en augmentation (alimentation, + 20 % ; salaires et charges, + 18 %), ont, en grande partie, annulé le bénéfice supplémentaire escompté. Les autres chapitres des recettes sont en augmentation et tout particulièrement la vente de livres : + 68 %. Cela est très encourageant. La littérature en espéranto est très vaste, très riche ; chacun peut trouver ce qui lui plaît et se cultiver agréablement. Si l'on veut que les non espérantistes reconnaissent la valeur de notre littérature, il faut que les espérantistes eux-mêmes soient persuadés de cette valeur. Ils doivent la faire vivre s'ils veulent qu'elle s'enrichisse encore.

Les programmes de nos stages sont à votre disposition. Nous avons déjà un certain nombre d'inscriptions fermes. Alors, ne tardez pas à vous inscrire. Un programme plus détaillé de chaque période paraîtra fin février. L'année 1973 doit être un succès comme les précédentes. Nous comptons sur vous tous pour cela. Vous trouverez cette année encore, à Grésillon, ce que vous cherchez : des cours, des conférences, des excursions, des distractions et des amis. Et tout cela dans ce cadre magnifique que tous les espérantistes ne connaissent pas encore.

Dans ce numéro, l'Association Culturelle nous donne le bilan de sa première année de remise en route. Bilan très positif qui va nous permettre de réaliser les premiers aménagements de la salle de conférences dont nous rêvions depuis longtemps. Nous remercions le Conseil d'administration de l'Association Culturelle, tous les donateurs dont nous commençons à publier la liste dans ce numéro, ainsi que tous ceux qui se sont spontanément inscrits à cette Association. Nous espérons qu'ils tiendront tous à venir cet été voir sur place la réalisation de la première tranche de travaux.

P. BABIN.

ABONNES BIENFAITEURS

1971

M. Rion (76)	15,00

1972

Mme Pibarot (30)	15,00
M. Combillard (75)	20,00
M. Coupeau (72)	30,00
M. Cuvelier Delas. (59)	15,00
M. Frangeul (49)	15,00
M. Guillaume (78)	1,500
M. Rabin (49)	15,00
Mme Mouneyrou (47)	20,00
Mme Vergnac (47)	20,00
M. Moulin (95)	15,00
M. Poulain (62)	15,00

1973

Mme Humm (84)	15,00
Mme Bougeois (25)	20,00
M. Trépier (74)	15,00
M. Motto (30)	20,00
M. Poly (75)	15,00
Mme Cantel (17)	15,00
S-ro Gelencser (Hongrie)	15,00
M. Baronnet (36)	15,00
M. Métivier (49)	15,00
M. Tragin (27)	15,00
M. Rousseau (75)	15,00
M. Barré (44)	15,00
Mlle Mauchien (80)	15,00
S-ro Schönrich (All. Féd.)	15,00
Mlle Drezet (25)	15,00
M. Guillaume (78)	15,00
Mlle Gallon (69)	15,00
M. Pons (09)	15,00
M. Regard (45)	15,00
M. Broise (27)	15,00
Mme Prigent (45)	15,00
M. Duflot (59)	15,00
Mlle Vazon (79)	15,00
Mme Pral (69)	15,00
M. Dumoulin (37)	15,00
M. Noël (76)	20,00
Mlle Chérault (78)	15,00
M. Lanz (93)	15,00
M. Brunel (34)	15,00
Mlle Hédelin (75)	15,00
M. Bourdelon (13)	15,00
M. Cadenel (13)	15,00
M. Reymond (13)	15,00
M. Garrigues (13)	15,00
Mme Jocono (13)	15,00
Mme Jurquet (13)	15,00
M. Lorenzini (13)	15,00
Mlle Villanova (13)	15,00
Mme Bariteaud (06)	15,00
M. Gennarini (06)	15,00
M. Masclet (06)	15,00
Mlle Sassi (06)	15,00
M. Martin (35)	15,00
M. Doury (93)	50,00
S-ro Mac Lennan (Grande-Bretagne)	60,00
M. Michaud (93)	15,00
M. Lloancy (Tunisie)	15,00
Mme Menut (69)	15,00
M. Goude (49)	15,00
Mlle Tulasne (49)	15,00
S-ro De Waard (Pays-Bas)	15,00
S-ro Vollegraaf (Pays-Bas)	15,00
S-ro Wielgus (All. Féd.)	40,00
Total	**1.125,00**

NOS JOIES

Dany Hervieu et Michel Guillaume nous ont fait part de leur mariage. Nous leur présentons nos meilleures vœux de bonheur.

Une petite Freya est née au foyer de nos amis Madzy et Gerrit Berveling van der Kooij, à Vlaardingen (Pays-Bas). Nos compliments aux parents et tous nos vœux à Freya.

Nicole et Dominique Babin remercient tous les amis qui leur ont envoyé des félicitations à l'occasion de leur mariage. Ils leur demandent de bien vouloir les excuser de reculer devant le nombre de remerciements individuels à envoyer.

NOS PEINES

Le père de Pierre et Yvonne Petit, nos amis de Rosny-sous-Bois, est décédé le 14 décembre. Que M. et Mme Petit trouvent ici l'expression de notre amicale sympathie.

ASSOCIATION CULTURELLE DU CHATEAU DE GRESILLON

AVOIR de l'Association Culturelle du château de Grésillon au 15 décembre 1972

Chèques postaux	938,86
Caisse d'Epargne	5.100,00
Action Grésillon	100,00
Détail :	
Donateurs	5.197,86
Membres	941,00
Total égal à l'actif	**6.138,86**

\+ cotisations ou dons versés directement à Grésillon,

Liste des donateurs (première liste)

Debande Gontran (Valence-d'Agen)	750,00
Centre Culturel (Valence-d'Agen)	250,00
Joly Ernest (Amiens)	200,00
Marly Pierre (Bordeaux)	100,00
Kohler E. (Besançon)	100,00
Llech-Walter (Perpignan)	100,00
Martin Robert (Rennes)	100,00
Micart M.-T. (Epineux-le-Séguin)	100,00
Bonnafous Elise (Carpentras)	100,00
Volpelière René (Nîmes)	100,00
Eyssautier Gabriel (Lyon)	100,00
Jouis Edgard (Bois-Guillaume)	100,00
Guillaume Jean (Feucherolles)	100,00
Julien Marcel (Aix)	100,00
Centre Culturel (Marseille)	100,00
Rougetet Gabriel (St-Germain-en-Laye)	100,00
Villegier René (Aix-les-Bains)	100,00
Verot F. (Saint-Etienne)	100,00
Langronier Charles (Perpignan)	100,00
Guillot Paul (Annemasse)	100,00
Capus André (Montpellier)	100,00
Centre Culturel (Nîmes)	100,00
Martinot Partout (Troyes)	100,00
Bourot Suzanne (Troyes)	100,00
Centre Culturel (Marseille)	100,00
Centre Culturelle (Calais)	100,00
Despiney Roger (Le Perreux-sur-Marne)	100,00
Houlgatte (St-Amand-Montrond)	100,00
Total	**3.700,00**

Maison Culturelle Espérantiste

(Fondateur : Henri Micard)

Château de Grésillon
49150 **BAUGÉ**

C.C.P. Nantes : 1485-39

PROGRAMME 1973

A PAQUES

PREMIERE SEMAINE : **Arrivée le 11 Avril — Départ le 18 Avril**

12e Semaine Culturelle

organisée par J.E.F.O.
sous l'égide de U.F.E.

Programme varié mis au point par les jeunes Cours — Causeries — Distractions

DEUXIEME SEMAINE : **Arrivée le 18 Avril — Départ le 25 Avril**

Semaine d'Etude

Cours — Conversation — Pratique de la langue

Pendant l'Été

Première Période

Arrivée le 1er Juillet — Départ le 22 Juillet

Semaines Culturelles Espérantistes

Dans le cadre de cette période auront lieu :

Rencontre de cheminots espérantistes

Rencontre espérantiste Ecole Moderne

Cours pour débutants, cours pratique, cours supérieur.

Reliure, vannerie, émaux.

Conversation.

Distractions diverses.

Excursions : 11 et 18 Juillet.

Deuxième Période

Arrivée le 22 Juillet — Départ le 5 Août

Quinzaine Internationale

Conférences sur des sujets divers.

Discussions.

Distractions diverses.

Excursions le 26 Juillet et le 2 Août.

Troisième Période

Arrivée le 5 Août — Départ le 26 Août

Semaines d'Etude

Cours pour débutants. cours pratique, cours supérieur.

Activités annexes (reliure, etc...).

Conversation.

Distractions diverses.

Excursions les 11 et 21 Août.

Quatrième Période

Arrivée le 26 Août — Départ le 9 Septembre

Quinzaine Culturelle

Cours — Conversation — Distractions

Excursions